# *Kunsidis Díaz-Canel kun la ?enerala direktorino de UNESCO en Parizo.*




Havano, 1 nov (RHK) La kuba prezidento estis akceptita de Audrey Azoulay, kadre de la  de la halto en Parizo survoje al Rusio kie komenci?os turniro kiu inkluzivos aziajn landojn.

Pasintjare Kubo kaj UNESCO festis la 70-an datrevenon de rilatoj fruktodonaj kaj solida reciproka ligo.

Diplomatiaj fontoj sciigis ke amba? partneroj donas prioritaton al temoj kiuj koncernas la organizon, inkluzive de edukado, kulturo kaj scienco, kaj la UNESCO  agnoskis  en pluraj fojoj la avancojn atingitajn de la insulo en tiuj sektoroj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/175430-kunsidis-diaz-canel-kun-la-generala-direktorino-de-unesco-en-parizo

# Radio Habana Cuba